

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



E N H A V O

	Paĝo
* * * — Kun streĉo senspira	1
M. Gorkij — Letero al blankrusiaj esperantisitoj	2
G. Simeonov, — La rezultoj de niaj kursoj	3
S. Hesapčiev. — Pri la rezultoj de niaj kursoj	4

BELETRO KAJ POEZIO

Ml. Isaev — Al majoro Gagarin	5
* * * — Aŭdas tero patrino	5
M. Langov — Venkanto de la Kosmo	5

HEROA PASINTECO

C. Murgin — El la kultura Esperanto-agado dum la faŝista teroro en 1923—1925	6
Hr. Iskrov — Laborista Esperanto-movado en Plovdiv	7
* * * — La 48-a U K de Esperanto en Sofio	9
Ada — G. Fandâkov	10
B. Simeonov — Lerneja vivo	11

ORGANIZA VIVO

NI RECENZAS

Abonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Reklamtarifo: 5 levoj por cm²; korespondanconoj: 0.5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovertpaĝo — 1000 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.	NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova	RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5
KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.	SOVETUNIO: J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.
	SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa bildo: Sofiaj esperantistoj dum la unuamaja manifestacio



KUN STREĈO SENSPIRA

En marto 1961 Sovet-Unio registris novan konkeron. Ĉirkaŭ la tero estis lanĉitaj la kvara kaj kvina sputnikaj ŝipoj. Ili plenumis sian difinitan programon en la ĉielforo kaj laŭ komando ili revenis al la surtera stacio en Sovet-Unio.

Tio estis la lastaj preparoj de la soveta scienco, kiu kun nekredebla rapideco kaj ekzakto kreis ĉiujn necesajn kondiĉojn por kosma ekflugo de la homo mem.

La informoj pri la kvina sputnika ŝipo estas ekskluzivaj pro sia signifo, sed jam neniu ekmiris. La surprizo, kun la antaŭaj sukcesoj de tiu speco provokis, estis ŝanĝita per streĉa kaj memfida atendo de la epokfara momento, kiam la homo, la Tero ido ekflugos al la fabela stelregno por esplori novajn mondojn, diveni novajn sekretojn kaj por firmigi sian regon super la naturaj fortoj. . .

La homaro ĉesigas sian spiradon atendente la grandiozan sciigon. . . kaj jen, la 12-an de aprilo 1961 estis lanĉita la sputnika ŝipo „Oriento“ kun la unua homo-kosmonaviganto, la soveta majoro Jurij Alekseeviĉ Gagarin. Post cirkulo ĉirkaŭ la Tero la sputnika ŝipo alteriĝis sur la difinitan havenon kaj la unua pasaĝero fiere raportis: „La veturado estis sukcesa! Mi ne havas traŭmojn kaj vundojn.“

Komenciĝas la flugado de la homo tra la kosmo. La socialisma sistemo montris ankoraŭfoje laŭ maniero plej elokventa sian avantaĝon super la kapitalismo.

La brilo de moskva tagiĝo „disŝiris la mondan mallumon“ kaj sune lumigis la vojon al la libero. Moskvo traboras la gloran vojon de la mondopaco. Moskvo proponas sian fortan manon al la subigitoj, por ke ili surpaŝu la historian arenon. Moskvo donis potencajn flugilojn al la homa genio, ke ĝi atingu la plej intimajn sekretojn de la vivo.

La simboloj, kiuj la fantazio de la plej saĝaj filoj de la homa genro kreis por esprimi siajn plej belajn emociojn, estas superitaj de la vivo. La genio de la sovetaj sciencistoj alproprigis al si kaj Prometeon, kiu donis la

fajron al la homo, kaj Hēraklon, kiu posedis supernaturan forton. La soveta homo akiris „la senliman potencon esti talenta kreanto“.

La diferenco inter la realo kaj fantazio ŝajnas forigita. Kaj la popoloj kun streĉo supera atendas nun pluajn informojn pri la perfektigo de la kosma flugado fare de la sovetaĵoj. La tuta mondo hodiaŭ direktas sian esperplenan rigardon al Moskvo.

Kun nova pli granda forto nun sonas la profetaĵoj de la senmorta nialanda proleta poeto Ĥristo Smirnenski, kiu diris en 1921:

Ĥo Moskvo, Moskvo!
El viaj placoj vi hodiaŭ diras
verdikton de la prem' centjara.
Vin Rom', London', Pariz', Berlin' admiras,
en vi nun estas tuta proletaro.
Fieras vi en via bru' haj brulo,

kun la sopir' pri lasta lukto
per ĉiu via viro kaj junulo
trumpetas vi tra mondo tuta,
kaj rompas la sklaveckatenojn! . .
Ĥo Moskvo, Moskvo!
vulkan' el koroj ardoplenaj!

MAKSIM GORKIJ

LETERO AL BLANKRUSIAJ ESPERANTISTOJ

La granda soveta verkisto Maksim Gorkij direktis en 1928 al la blankrusiaj esperantistoj jenan leteron:

„La deziro krei lingvon komunan por ĉiuj homoj estis unu el tiuj kuraĝaj ĝis frenezo deziroj, kiuj ĉiam servis, servas kaj servos al la afero de la organizado de la mondo laŭ la volo de la homo kaj por la disvolvo de liaj kapabloj.

Estas fakto nerefutebla, ke kiam la homaro parolas unu lingvon, la laborista homaro multe pli rapide komprenos la egalecon de siaj interesoj.

La argumento kontraŭ Esperanto estas, ke ĝi estas artefarita lingvo, kaj lingvojn oni arte ne kreas. Mi ne scias kiel estis kreitaj la lingvoj tiam, kiam la homo la unuan fojon sentis la bezonon paroli; la teorioj pri la deveno de la parolo ŝajnas al mi nesufiĉe klarigantaj tiun ĉi proceson. Sed al mi ŝajnas, ke ni, homoj rajtas diri: ĉio, kion ni nomas „kulturo“, estas kreita de nia scienco, tekniko, arto, parolo — tio nome, kio nin apartigas de la bestoj — ĉio ĉi estas artefarita.

La teokulereto estas objekto artefarita, tiel kiel artefaritaj estas la tranĉilo, la botoj, la veturilo, la boato, la aŭto, la vaporŝipo, la libro, la muziko, la bildo.

Por la homo — kiel ankaŭ por la bestoj — estas nature trinki per mano, iri nude, muĝi kiel besto, sed estas tute nenature elpensi Prometeon, Faŭston, Donkiĥoton.

Ni loĝas en domoj, urboj, inter objektoj, faritaj per la forto de nia racio kaj imago, per la forto de nia volo, por ke nia vivo estu pli facila kaj pli agrabla. Kiam la homoj konscios la bezonon paroli unu lingvon, ankaŭ tio okazos. Ĉio sur la tero estas kreata per streĉo de nia volo, nia racio kaj nia imagokapablo. Homo devas sugesti al si: mi povas fari ĉion.

Ni ne devas timi la kuraĝon kaj la frenezaĵojn dum laborado kaj kreado.

La plej granda kaj plej valora el ĉio, farita de la homoj, estas: la scienco, arto, tekniko. La unua kaj la dua, kaj la tria estas tute frenezaj (laŭ ideo kaj plenumo) aferoj.“

LA REZULTOJ DE NIAJ KURSOJ

En „Bulgara Esperantisto“ aperis artikoloj pri diversaj temoj, sed mi ne legis artikolon pri la rezultoj de niaj kursoj rilate la metodon de la instruado.

De tri jaroj mi gvidas kursojn en urbo Vidin. Sincere mi devas konfesi, ke mi ne estas kontenta de la ĝenerallaj konoj de miaj gekursanoj. Vere la kursanoj atingis iajn rezultojn. Ili povas libere kaj memstare legi tute novajn tekstojn. Ili povas traduki ĉion bone kaj laŭsence, sed la tria parto de nia kursa laboro — la konversacio — estas ne plensukcesa. La gekursanoj tre malfacile povas formi la respondan frazon aŭ fari pli longan eldiron. Ili kun granda malfacileco povas partopreni en pli longa konversacio, esprimante siajn pensojn mallerte.

Mi ofte demandas min: kie troviĝas la kaŭzo? Ĉu en mi mem, kiel kursgvidanto, aŭ en la metodo de la instruado, aŭ en la lernolibro? Laŭ mia opinio la lernolibro direktas la tutan instruadon.

Aŭ oni devas labori laŭ la lernolibro, aŭ oni devas ignori ĝin. La lernolibro katenas kiel la kursgvidanton, tiel ankaŭ la gekursanojn.

En la unuaj du jaroj mi gvidis kursojn laŭ la lernolibro de k-do Iv. Sarafov kaj S. Hesapčiev. La ĉi jara kurso estas laŭ la lernolibro de k-do As. Grigorov.

Ambaŭ lernolibroj estas kun tre multaj lecionoj — po 24. Tio signifas, ke mi devas labori 6 monatojn po unu horo semajne. La tempo de 6 monatoj estas tre longa. La gekursanoj deziras en 3 aŭ 4 monatoj ricevi plenajn konojn pri la gramatiko kaj vortaro de la lingvo. Ni devas memori bone, ke la geurbanoj havas ankaŭ aliajn sociajn devojn. Ili povas dediĉi nur po unu horo semajne al la lingvo. Nun

ĉiu homo estas tre okupita en sia profesio kaj havas diversajn aliajn taskojn, ligitajn kun lia ĉiutaga laboro. Do, ni devas estimi kaj netrouzi la deziron de la homoj studi la lingvon.

Do, la Centra Komitato de nia asocio devas ellabori novan lernolibron, kiu devas enhavi ne pli ol 15 lecionojn.

La nova lernolibro devas doni eblecon al la gakursanoj por memstara laboro. Mi proponas, ke la lecionoj devas esti kun bildoj sub la titoloj: nia klasĉambro, nia familio, la stratoj, en la ĝardeno, partoj de la homa korpo k t p. La gekursanoj observante la bildojn, povas pli libere esprimi siajn pensojn. Ni ofte parolas pri enkonduko de la lingvo en la lernejojn. Tamen ĉu ni estas pretaj kun tia serioza kaj grava tasko? Tute ne! Ni ne povas proponi al la ĝelernantoj taŭgajn lernolibrojn laŭ la principoj kaj la postuloj de la nuntempa lingvoinstruado.

Ni pripensu ankaŭ tiun demandon. Ni ĉiuj scias, ke la metodo de Andreo Ĉe donas pli bonajn rezultojn. Bone estus, se nia Centra Komitato organizus 3—5 tagajn seminariojn por kursgvidantoj dum la somero.

Tio estas arangebla aŭ en Sofio, aŭ en iu ripozloko, kie la kursanoj lernos kaj ripozos.

Mi scias, ke estas spertaj kamaradoj, kiuj perfekte konas la instrumentojn. Se ni sincere deziras plibonigi la instruadon de la lingvo kaj atendi pli bonan rezulton de la kurso, la CK devas helpi al la kursgvidantoj per interŝanĝo de sperto.

Sen tia helpo la rezultoj de la kursoj ĉiam restos nekontentigaj.

Georgi SIMEONOV,
Vidin

PRI LA REZULTOJ DE NIAJ KURSOJ

Leginte la artikolon de s-ano Georgi Simeonov, mi volas sciigi al la legantoj mian sperton kaj miajn pensojn.

Mi gvidis multajn kursojn — jam laŭ la lernolibro de A. D. Atanasov — ADA, dum la lastaj jaroj laŭ aliaj lernolibroj kaj multajn kursojn mi gvidis sen lernolibro. Certe la grandan plimulton de miaj kursoj mi gvidis sen lernolibro. Tio donas al mi eblecon elekti la plej gravan el la materialo depende de la tempo kaj de la nivelo de la kursanoj pri kiu mi disponas. Dum la aŭtuno de 1958 mi gvidis dek kursojn en Pollando kaj komencis novan serion de dek kursoj sen lernolibro. Dum la pasinta jaro mi gvidis du kursojn sen lernolibro. Dum tiu ĉi ankaŭ du (unu el ili estas nia kurso por instruistoj). Miaj kursoj en Pollando havis 10 okupojn po du lernhoroj — entute 20 lernhorojn. Iujn el la maloftaj sufiksoj kaj prefiksoj mi ne instruis. Ankaŭ mi ne instruis ĉiujn detalojn de la gramatiko. Mi partoprenis la seminarion, kiun gvidis persone Andreo Ĉe, kiu blinde kopias kaj uzas kiun ajn metodon aŭ tute strikte instruas laŭ lernolibro, ne povos atingi bonajn rezultojn.

Mi konstruis mian instruadon sur jenaj principoj:

1. Mi faras unuhoran prelegon en Esperanto kun traduko en polan lingvon. Tio estas bonega ekzerco, en kiu la aŭskultantoj partoprenas, ne montrante sin antaŭ la ceteraj (pasive).

2. La vortaro estas malgranda kaj konkreta. Mi uzas multajn (sed konatajn) proprajn nomojn.

3. Mi kaj la kursanoj faras multegajn eblajn kombinojn per la vortoj kaj samtempe donas, ricevas, fermas, malfermas, metas, prenas, tenas: mi donis al li; li donis al mi, al vi; mi ricevis de vi, de li, de ŝi. Botev estas poeto, Botev estas bulgaro, li estas bulgara poeto, Bagrjana estas bulgara poetino, estas bulgarino k t p.

En la kursejo poeto, poetino, bul-

garo, bulgarino estas multe pli konkretaj ol patro kaj patrino, frato kaj fratino, bovo-bovino, koko-kokino.

4. Mi uzas objektojn, kiujn mi povas alporti en la kursejon: kraĵojn diverskolorajn, skatolojn (plena, malplena), ŝtopilon de botelo (korkan, metalan), razilojn, tranĉilon, plilongigilon, akrigilon (por kraĵoj), kudrilon, kudrilegon k. t. p.

5. Mi instigas la kursanojn korespondi jam ĉe la unua, dua, tria leciono, donante al ili la stereotipan leteron. Al iliaj leteroj mi aldonas miajn kun peto trovi por ili konvenajn korespondantojn. Mi sendas la leterojn al miaj konataj aktivaj esperantistoj, kiuj konas multajn aliajn aŭ gvidas kursojn. Ofte ni ricevis respondojn ĉe la dua, tria leciono. Se ni donus anoncon pri korespondado, povas veni tro multe da leteroj kaj en la tempo, kiam mi ne plu gvidas la kurson, kompreneble, en la komenco ne ĉiu kuraĝas komenci korespondadon.

Estas tute alia afero, se la lernolibro estas bona kaj laŭ ĝi aŭtodidakte eĉ oni povas lerni la lingvon. En la pasinteco kaj ankaŭ nun multaj esperantistoj lernis kaj lernas la lingvon ne en kursoj, sed aŭtodidakte.

Mi opinias, ke la lecionoj devas esti eĉ tridek. Sed laŭ la konkretaj kondiĉoj la kursgvidanto povas elimini parton de la materialo. Kompreneble li devas fari tion lerte.

Mi kun plezuro akceptis vizitojn ĉe miaj kursoj.

Instruante kian ajn materialon, la kursgvidanto ĉiam povas doni demandojn por ricevi respondojn de la kursanoj, eĉ se tiaj demandoj ne estas donitaj en la lernolibro. La lerteco, sperteco kaj majstreco de la kursgvidanto estas la plej grava, la ĉefa faktoro ĉe la instruado — sen lernolibro — la kursgvidanto povas instrui, sed sen kursgvidanto la lernolibro malfacile instruas.

Simeon HESAPĈIEV

AL MAJORO GAGARIN**Mladen Isaev**

La homo kiu kun aŭdaco
 sur ter' revenis en persist',
 post flugo tra la kosma spaco
 ja digna estas komunist'.

Vidinte mem ĉielan foron
 li ree estas en la hejm'.
 Kaj lia heroaĵo glora
 por kantoj vervaj estas tem'.

Tradukis: At. Lakov

AŬDAS TERO PATRINA***E. Dolmatovskij**

Aŭdas kaj scias
 Fero patrina,
 kie vi flugas en alto senfina.
 Kaj ĝi karese,
 ame vin gardas
 per la stelaro de muroj de Kremlo,
 turoj de Kremlo
 zorge vin ĉiam rigardas.

Aŭdas kaj scias
 Tero patrina,
 kiel vi venkas en lukto obstina,
 kaj ĉiujn barojn

rompas sen laco,
 ĉar ŝi por vera triumfo vin sendas,
 ĉar vi defendas
 sanktan aferon de paco!

Aŭdas kaj scias
 Tero patrina,
 ke vi renkontas sur vojo senfina
 nubojn kaj dubojn,
 sed en kurado
 tra la tempesto de tondro kaj vento —
 venas kun venko
 al via cel', kamarado!

El la rusa: K. Gusev

* Tiun ĉi popularan rusan kanton Gagarin kantis
 malsupreniĝante de la kosma orbito al la tero.

VENKANTO DE LA KOSMO

En universaj foroj
 la steloj brilis rave,
 kometoj veste-oraj
 tranĉadis kvazaŭ glave
 ĉielan korpon bluan,
 planedoj en vualo
 sekvadis vojon pluan.

Rigardis homoj streĉe
 al kosmo la senfina,
 ekkoni reve serĉis
 sekretojn kaj enigmojn.
 Poetoj pri lun', steloj
 verkadis ja senĉese
 fabelojn, kantojn belajn.

Ekflugis jen Gagarin
 per sia ŝip' giganta
 al fora kosma maro!
 Senfinon penetrante,
 alportis li en ordo
 sunerojn radiantajn
 el la fabela mondo!

Gagarin, hom' soveta!
 Simbolo de aŭdaco,
 de suprenir' impeta!
 La kosman stelan spacon
 unue hom' soveta
 traflugis brave, pace,
 kun kor' oferopreta!

Mihail Langov

EL LA KULTURA ESPERANTO- AGADO DUM LA FAŜISTA TERORO EN 1923—1925

La ribelo de bulgara popolo kontraŭ la faŝisma reĝimo en septembro 1923 fiaskis. La faŝistaj regantoj jubilis. Kaj ili havis gravan pretekston pri tio. Ili sukcesis reteni al si la ŝtatpotencon. Ili mortigis pli ol 20 000 komunistojn kaj aliajn progresemaĵojn homojn. Multaj kontraŭfaŝistoj estis aŭ malliberigitaj, aŭ elmigris en fremdlandon. La saman sorton havis ankaŭ la progresemaĵoj esperantistoj.

Jen ekzemple letero de k-do Georgi Sapungiev — esperantisto el Varna — kiu donas al ni bildon pri la vivo de politikaj elmigrintoj en Rumanio. „ . . . Mi suferas kiel ĉiuj elmigrintoj nun. Mi estas soleca kaj for de miaj hejmanoj. . . Mi forkuris subite, neatendite kaj ili malfrue eksciis tion. Mi longtempe estis loĝanto de la rumanaĵoj malliberejoj, mallumaj kaj malvarmaj. . . Kaj fine mi estis liberigita kaj venigita ĉi tien, en la malgrandan urbon Targuiu. . .

Ni, ĉiuj elmigrintoj, laboras en unu ligaj-fabriko. Ni segas grandajn kaj dikajn arbojn en la arbaro. Sed la neĝo estas granda kaj la vento siblas kaj frostodolorigas niajn piedojn kaj manojn. Terura malvarmo! Mi ĉi tage tremas, frostas. . . Kaj malgraŭ tio ĉi mi esperas pri belaj tagoj venontaj! („Bulgara Esperantisto“, jaro V, n-ro 5 de januaro 1924).

La vivo de la popolo en nia lando fariĝis netolerebla. La persekutoj al la progresemaĵoj homoj daŭris amase kun barbara krueleco pli ol 2 jarojn post la ribelo mem. La sangaj orgioj de la faŝistoj fariĝis afero oridnara en nia lando. Tio estis frakasa bato al la kultura agado ĝenerale kaj al la Esperanto-agado speciale. La konstanta minaco

pro la persekutoj forpelis la grandan parton de la malnovaj esperantistoj el la kunvenoj. Maldensigis la intima vivo de la esperantistaro. Kiom dolorplena estas la letero de ĉi tiama aktivulo kiu koraŝire vokas: „Kien forflugis la malnova enviinda intima vivo de la esperantistoj?“ kaj plue: „Niaj kunvenoj jam estas mizere vizitataj. Oni refaras antaŭ kelkaj personoj, kaj ilia plimulto estas novuloj!“ („Bulgara Esperantisto“, jaro V, n-ro 9 de majo, 1924).

La Ministerio de la Instruado rifuzis oficigi instruistojn de Esperanto kaj forpelis Esperanton el la lernejoj. El multaj lokoj oni signalis proteste pri la malhelpoj de la lerneja aŭtoritatoj („Bulgara Esperantisto“, jaro V, n-ro 4, decembro, 1923).

La XI-a Kongreso de bulgaraj esperantistoj (en Ruse, 1924) akceptis la proponon de k-ino Spasova kaj decidis: „Peti la Ministerion de la Popola Instruado, ke ĝiaj organoj ne malhelpu la disvastigon de Esperanto en la lernejoj kaj ne embarasu la esp. lernantajn grupojn („Bulgara Esperantisto“) jaro VI, n-ro 1 de septembro, 1924.

Konforme al la kongresaj decidoj la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio sendis ekspozon al la Ministro-Prezidanto kaj al la Ministro de la Internaj Aferoj („Bulgara Esperantisto“, jaro VI, duobla n-ro 3—4 de novembro—decembro 1924) kaj iom poste al la Ministro de la Popola Instruado („Bulgara Esperantisto“, jaro VI, duobla n-ro 5—6 de januaro—februaro, 1925), klarigante, ke ĝia agado estas kultura kaj petante ke la aŭtoritatoj ne malhelpu. La faŝistoj estis surde-mutaj alla petoj de esperantistoj.

Sed spite al la malhelpoj kaj la teroro starigitaj de faŝistoj, la progresemaĵoj esperantistoj daŭrigis obstine sian kulturan agadon. Jen estas letero de tiu tempo, kiu atestas pri la agmaniero de la progresemaĵoj esperantistoj: Ĝi estas verkita de k-do Iv. Sarafov (tiam en Plevno) je la 14. 5. 1924 kaj sendita al k-do Panajot Kolev en Sofio,

sekretario de la Komunista Esperanto-Grupo „Balkana Liberiga Stelo“ en Sofio kaj sekretari-kasisto de Bulgara Esperantista Societo:

„Mi ricevis de k-do Lerchner per kiu li postulis de mi muziknotojn por revoluci-kantaro¹ — eldonota de SAT.

Ĉio estas preta, sed mankas kantoj de nia lando. Mi tuj sendis al li muziknotojn de „Haĝi Dimitro“ kaj „Mia preĝo“. Mi sendis al li ankaŭ la tradukon de „Batalo“, sed notojn mi ne posedis kaj pro tio mi ne sendis. Se vi estas libera trovu tuj la dirigenton de nia partia horo, prenu la notojn de „Batalo“ kaj se eblas — por aliaj bulgaraj kantoj revoluciaj, ekzemple de Ĥr. Smirnenski, Dim. Poljanov, aŭ aliaj bulgaraj revoluci-poetoj kaj tuj sendu ilin al Lerchen. Sed por „Batalo“ nepre. Ankaŭ estas unu versaĵo de St. Miĥajlovski — „Antauen! la vivo estas batalo“ — se vi povas trovi notojn por ĝi, ĝi estas konvena.

Mi sendis de Ĥr. Smirnenski — versaĵon kaj notojn „Noktomezaj ombroj“. Hodiaŭ mi ree sendos al li la notojn kaj tradukojn de „La pendigo de Vasil Levski“ kaj de „Al mia unua amatino“. Mi esperas, ke vi faros la neceson. Sendu al mi la adresojn de SAT-anoj el diversaj urboj kaj 20 ekz. de „La laboristaro kaj la internacia lingvo“.²

¹ „Proletaria Kantaro“ aperis en 1924 en Germanio. En ĝi estas publikigitaj kvin bulgaraj revoluciaj kantoj: „Batalo“, „En la drinkejo“, „Mia preĝo“, „Haĝi Dimitro“ de Ĥristo Botev kaj „Kamarada Kanto“ („Druĝna pesen“) de G. Kirkov. En la Kantaro aperis 16 rusaj revoluciaj kantoj 15 polaj, 2 norvegaj, 4 germanaj, 1 portugala, 2 svedaj, 2 italaj, 2 hebreaj, 3 anglaj, 1 nederlanda, 3 francaj, 2 estonaj, 2 hungaraj, 2 belgaj, 2 jugoslavaj (kroataj) 2 finnaj, 1 kastila, 2 hispanaj, 2 ĉinaj, 10 internaciaj Inter kiuj 2 originalaj (en Esperanto).

² Temas pri la propaganda bulgarlingva broŝuro, kiun aperigis la Komunista Esperanto-Grupo „Balkana Liberiga Stelo“ en Sofia — 1922.

³ Estas esprimita espero kaj bondeziro pri renkontiĝo en urbo Ruse, kie okazis iom poste (la 27-an—29-an de julio 1924) la XI-a Kongreso de bulgaraj esperantistoj.

⁴ Ĝi estas aludo pri okazigo de fakkunsido de komunistaj esperantistoj en Bulgario.

Skribu ion el Sofio! Korsalutojn al ĉiuj niaj kamaradoj.

Estu preta!

Ĝis revido en Ruse.³ Ĉu ni ne devas pretigi la kondiĉojn ekde nun por nia fakkunsido.⁴ Ĉu estas niaj kamaradoj-esperantistoj en Ruse?

Kore kaj kamarade via: Iv. Sarafov“.

La enhavo de la letero atestas pri la alta konscio de bulgaraj esperantistoj, kiuj spite al la teroro daŭrigis sian kulturan kaj revolucion agadon kaj kontribuis laŭ siaj povoj por renverso de la faŝisma reĝimo en nia lando kaj por progreso de internacia lingvo Esperanto. Tute ne estas superflue menci, ke pro simila agado oni evidente riskis sian vivon, ĉar oni scias kiom multe da kulturaj agantoj estis forbruligitaj en la fornoj de la Direkcio de la Polico. Tie pereis Geo Milev, aŭtoro de la poemo „Septembro“, Ĥristo Jasenov, elstara poeto kaj multaj sen-nomaj aktivuloj de popolaj organizaĵoj. La kulmino de tiuj barbaraj persekutoj oni atingis per la amasaj arestoj kaj pogromoj al la progresemaj homoj en la printempo de 1925, tuj post la kvaŭza mendita atenco en la katedralo „Sankta Dimanĉo“ en Sofio.

Canko MURGIN

LABORISTA ESPERANTO-MOVADO EN PLOVDIV

La historio de la Esperanto-movado en Plovdiv estas vasta kaj ampleksas pli ol sesdek jarojn. Mi ne intencas rakonti pri ĉio, sed limigos min je unu periodo, kiu estas karakterizata per rimarkinda fakto — la enpenetro de Esperanto en la laboristan klason.

Ĉe neniuj aliaj klasoj la bezono de helplingvo estas tiom akre sentata, kiom ĉe la organizita laboristaro. Nek la monon, nek la tempon havas laboristoj lerni kelkajn fremdajn lingvojn.

Post la Unua mondmilito, la laborista klaso, sub la influo de la Granda Oktobra Revolucio tre vigle reorgani-

zigis en ĉiuj landoj. Plovdiv kun sia multnombra laborista klaso estis unu el la revoluciaj bazoj en Bulgario. Multaj laboristoj eklernis la lingvon por fortikigi la internacian solidarecon. Ili uzis la lingvon por informi siajn kolegojn en aliaj landoj pri la teroro en Bulgario. En la antifaŝistaj esperantogazetoj ofte aperis protestoj kontraŭ la teroro. La bulgaraj faŝistaj regantoj estis surŝutataj per protestaj postuloj ĉesigi la persekutojn al laboristoj.

Dank' al Esperanto plovdivaj esperantistoj informigis pri la sukcesoj de la revolucia movado en la mondo — Ĉinio kaj multaj aliaj landoj. Ili, malgraŭ la cenzuro, korespondis kun sovetaĵ esperantistoj kaj sciis kiel marŝas la socialisma konstruado en ĉi lando.

La faŝistoj en nia lando severe persekutis la eldonantojn de verkaro de Marks, Engels kaj Lenin. Dank' al Esperanto ni povis legi en Bulgario la librojn: „Manifesto de komunismo“, „Ŝtato kaj revolucio“ de Lenin, verkojn de Barbus, Lavrenev kaj multaj sovetaĵ poetoj kaj verkistoj — Majakovskij, Damjan Bednij ktp., tiel Esperanto praktike servis por la klasaj celoj de la laboristaro.

Pruvante sian utilecon, Esperanto trovis varman aprobon inter la gvidantoj de la komunista movado en Plovdiv. La plej gravaj gvidantoj mem, kiel ekz. la sekretario de la komunista partio — Ĥristo Koĉev, — de la Komso-molo Ivan Armin — uzis la lingvon. Dank' al tio la Esperanto-movado inter laboristoj ricevis novajn taskojn. La plej bonenhavaj leteroj el Sovetlando, Germanio, Aŭstrio, Ĉinio, Japanio, k. c. estis publikigataj en la laborista gazetaro aŭ utiligataj por „vivantaj gazetoj“. Estis organizita speciala gazet-servo, kiu liveris al fremdlandaj redakcioj artikolojn pri la klasaj problemoj en nia lando. Tre ofte en sovetaĵ, francaj, ĉinaj kaj japanaj gazetoj aperis niaj informoj.

Kreiĝis vera stabo de tradukistoj, kiuj tradukis versaĵojn, rakontojn, no-

velojn de famaj bulgaraj poetoj kaj verkistoj. Eĉ en la Malproksima Oriento oni aŭdis pri Geo Milev kaj Ĥristo Smirnenski, pri G. Karaslavov kaj K. Belev, kiuj verkis pri la vivo kaj batalo de la bulgara laborista klaso.

. En nialanda gazetaro aperis skizoj kaj rakontoj el la civil-milito en Ĉinio, rakonto pri la socialisma konstruado en USSR.

Dum la ekskursoj en la ĉirkauaĵoj de Plovdiv, Asenovgrad kaj Pazargik la geesperantistoj kantis revoluciajn kantojn el ĉiuj landoj.

Ĉi nobla agado pikis la okulojn de la faŝistoj en Plovdiv. Dum la jaro 1935 oni malpermesis la agadon de la laborista Esperanto-movado kaj arestis ĝiajn gvidantojn. La plimulto el ili estis kondamnitaj kaj pasigis en diversaj malliberejoj longan tempon, sed ankaŭ en la malliberejoj ili trovis adeptojn inter la politikaj kondamnitaj.

Kiam eksplodis la mondmilito, la plovdivaj esperantistoj estis en la unuaj vicoj de la batalantoj. Multaj el ili fariĝis partizanoj kaj partoprenis batalojn kontraŭ la germanaj okupantoj kaj iliaj bulgaraj lakeoj.

En la tornistroj de la partizanoj oni portis ankaŭ lernolibrojn de Esperanto. Du el la gvidantoj de la partizana taĉmento „Anton Ivanov“ — Spartak kaj Marin estis fervoraj esperantistoj. Ili ambaŭ pereis en la batalo kontraŭ la faŝistoj. En aliaj partizanaĵ taĉmentoj — „Ĥristo Botev“, „Georgi Dimitrov“, „Vasil Kolarov“, „Levski“ en la sama regiono ankaŭ pereis geesperantistoj — Vela Peeva, Argir Stoilov, St. Manĉev kaj aliaj.

Pereis kiel kaptitoj de la faŝistaj pendigistoj aktivaj esperantistoj kiel Todor Sofroniev, David Sasonov, Rajĉo Kirkov kaj multaj aliaj.

Jen pro kio la laboristaj esperantistoj alte ŝatas sian popolan ŝtaton, ĉar por ĝia konstruo ankaŭ ilia sango estas encementita. Jen pro kio ili servas per Esperanto al sia pacama popolo.

Hr. ISKROV,
Sofio

La Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio sendis je la 27-an de januaro 1961 la jenan leteron al la aganta prezidanto de UEA:

**H. W. HOLMES,
Londono, Anglio**

Estimataj Samideanoj,

Bulgara Esperantista Asocio havas la honoron direkti al Vi peton, ke la 48-a Universala Esperanto-Kongreso en 1963 okazu en Sofio, la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario.

Jam delonge la bulgaraj esperantistoj havis la deziron gastigi en sia lando Universalan Esperanto-Kongreson. Vi certe scias, ke la bulgara Esperanto-movado estas unu el la plej malnovaj en la mondo kaj havas solidan bazon. Sufiĉe estas noti, ke nun la Bulgara Esperantista Asocio nombras pli ol kvar mil membrojn, kaj ekster ĝi, kiel neorganizita amaso restas multe pli granda kvanto da esperantistoj. Tio ĉi estas facile klarigebla, ke ĝis nun la sumo de la eldonitaj kaj disvenditaj lernolibroj de Esperanto por bulgaroj estas ne malpli ol 300 000 ekzempleroj kaj tio, kio ofte impresis alilandaj s-anoj, kiuj vizitis nian landon estas la fakto, ke Esperanto penetris ne nur en la urboj, sed ankaŭ en la vilaĝoj.

La granda plifortigo de la Movado dum la lastaj jaroj certe estas bone konata al Vi. La landajn kongresojn de la Bulgaraj Esperantistoj en Varna (1958) kaj en Târnovo (1960) partoprenis po 1500 kongresanoj, el kiuj kelkdekoj da reprezentantoj el aliaj landoj

Ni aldonu, ke nun Esperanto ĝuas tre favoran rilaton de la ŝtataj aŭtoritatoj. La Ŝtata Fremdlingva Eldonejo eldonis kelkajn bonajn librojn en Esperanto kaj ĝia agado en tiu direkto daŭros. En nia lando nun aperas la

jenaj Esperanto-gazetoj: „Nuntempa Bulgario“, „Bulgara Esperantisto“, „Bulgara filmo“, „Internacia Ĵurnalisto“.

Tiu ĉi stato pravigas kunvokon de Universala Esperanto-Kongreso en Bulgario.

Vi kredeble scias, ke en 1923 la Universala Esperanto-Kongreso en Nurenbergo kun granda entuziasmo decidis, ke la sekvanta XVI UK okazu en Sofio. Pro venintaj post tio malfavoraj cirkonstancoj de interna politika karaktero tiu ĉi decido bedaŭrinde ne povis realiĝi. Nun feliĉe la stato estas radikale ŝanĝita. Ni jam povas informi Vin, ke la plej altaj ŝtataj instancoj decidis akcepti la 48-an Universalan Esperanto-Kongreson en la ĉefurbon de Bulgario.

Konsiderante la grandan nombron de entuziasmaj geesperantistoj en nia lando, ni povas garantii modelan aranĝon de unu vere brila Universala Kongreso. La loĝeja problemo estos sukcese solvita: ne nur komfortaj ĉambroj en hoteloj de diversaj kategorioj, sed ankaŭ komunaj loĝejoj. La nutraĵo en nia lando ne estas pli multekosta ol en la okcidenteŭropaj landoj. Por la bezono de la kongresaj laboroj estos disponebla vasta salono kaj sufiĉa nombro de kunvenejoj por fakkunsidoj, komisionoj k. a. La Bulgara lando prezentas ankaŭ interesajn objektojn por ekskursoj. Bulgara Esperanto-Teatro, konsistanta el bonaj profesiaj geaktoroj manifestos sin certe ne malpli sukcese ol ĝi faristion dum la Universala Kongreso en Varsovio.

Fine ni devas mencii kaj aparte emfazi ankaŭ, ke Universala Kongreso en Sofio efikos stimule en plej alta

grado la plivigligon de la Movado ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en ĉiuj najbaraj landoj, en la tuta Balkana Duoninsulo, kaj precipe en tiuj najbaraj landoj, kie la Movado estas ankoraŭ malforta.

Ekspozante ĉion ĉi, ni ne dubas, ke la estraro de UEA favore akceptos nian inviton kaj prenos la nece-

san decidon. Frua decido havos por ni grandan signifon, ĉar tuj post ĝi ni komencos la antaŭpreparan laboron.

Volu akcepti, karaj Samideanoj, la esprimon de niaj bonaj samideanaj sentoj:

Prezidanto:

HR. GOROV

Sekretario:

V. OLJANOV

GEORGI FANDĀKOV

La 27-an de februaro j. k. en Sofio mortis, en sia 88-jara aĝo la esperantista veterano — Georgo Fandâkov. Forpasis ankoraŭ unu el la malmultaj reprezentantoj de tiu generacio esperantista, kiu laboris en la plej malfacila periodo de nia enlanda movado kaj kiu sukcesis krei solidan fundamenton por la evoluo kaj vasta penetro de Esperanto en la popolaj amasoj.

Georgo Fandâkov naskiĝis en 1873 en la negranda urbo Ajtos. Modesta oficisto, li servis en Ĥaskovo ĉe la tiam loka doganejo kaj en 1907 konatiĝis kun la Internacia Lingvo pere de iu instruisto, kiu komencis lerni Esperanton, korespondis per ĝi kun alilanduloj, kaj altiris ankaŭ Fandâkov al la nova movado.

Pli malfrue en 1908, transirinte en Sofion, li interesigis pri Esperanto Milčo'n Georgiev, en kies familio li loĝis. Ili ambaŭ trovis tiam Georgo'n Oreškov kaj demandis pri lernolibro. Oreškov sendis ilin al Teodoro Kânev, kiu havigis al ili la deziritan lernilon („Esperanto en 10 lecionoj“ de Cart kaj Pagnier, en bulgara traduko de T. Kânev kaj G. Atanasov).

Ambaŭ amikoj interhelpante, sin, ellernis bone la lingvon kaj komencis propagandi ĝin, ĉiu en sia medio. Granda estas la merito de Fandâkov pro tio, ke li donacis al la esperanto-movado tian energian kaj senrezerve sindonan adepton, kia pruviĝis Milčo Georgiev.

Fandâkov partoprenis aktive kaj senlace la enlandan movadon. Modesta, senpretenda li ne strebis famigi sian nomon, ne trudadis sian personon — sed la bulgaraj esperantistoj bone pritaksis liajn kvalitojn kaj difinis al li indan lokon en la gvidkorpoj de la movado. Jam antaŭ la 1912 li konstante kaj vigle partoprenis en ĉiuj manifestaĵoj de la Esperanto-vivo en Sofio. En 1921 li estis membro de la



Kontrola Komitato de la BEA, en la sekvinta 1922 jaro la Kongreso de la bulgaraj esperantistoj elektis lin membro de la Centra Komitato de la asocio. En la postaj jaroj li estis prezidanto de la Sofia Esperantista Societo.

En la hejmo, kie loĝis Fandâkov kaj Milčo Georgiev, regis vere esperanta atmosfero. Afabla akcepto, gaja, ŝercema tono, intimeco plenigis la domon kaj multaj sofiaj esperantistoj kun plezuro vizitis ĝin. Ĉiuj hejmanoj dividis tiun intiman intersamideanan vivon.

En la agado de ĉiu nova esperantista generacio en nia lando Georgo Fandâkov kontribuis sian helpon kaj sian sperton. Li restis fidela kaj sindona al la movado vere ĝis la lasta spiro. En siaj lastaj tagoj li esprimis deziron vidi min. Mi trovis lin en senespera stato. Li estis plejparte en la svendormeto, sed de tempo al tempo lia rigardo heliĝis; kolektinte siajn lastajn vivfortojn li ekparolis — kaj parolis prudente, sed baldaŭ denove dromis en duonkonscian dormemon. Kaj ni parolis en Esperanto. Mi miris, kiel

li povis en tia stato konstrui korekte siajn frazojn kaj esprimi klare siajn pensojn en la amata de li internacia lingvo. Li diris al mi, ke siajn esperantajn librojn li lasas al la Sofia Esperantista Societo kaj petis min prizorgi tion post lia morto. Post kvar tagoj oni sciigis min pri lia fino.

Lia edzino transdonis al mi liajn parolojn en la lasta minuto de lia vivo. Li ripetis la arangon pri siaj Esperantaj libroj kaj testamente diris siajn konsilojn por la juna esperantista generacio: ke ĝi havu lian vivon kaj lian agadon por Esperanto kiel ekzemplon kaj ĉiam kun fido laboru — ĉar Esperanto triumfos! — tio estis liaj lastaj testamentaj paroloj.

La 1-an de marto, en ĉeesto de multaj sofiaj geesperantistoj, la Patrio-Tero akceptis la senvivan kadavron de nia brava samideano.

ADA

L E R N E J A V I V O

Je la komenco de kuranta lernojaro estis organizitaj en la instruista kulturdomo en Sofio du kursoj. La unua kurso estas por kursgvidantoj. Ĝin partoprenas regule tridek geinstruistoj kaj kursgvidantoj. La celoj de la kurso estas: pristudo de la gramatikaj kaj instrumentodaj demandoj, praktika apliko de la teorio.

La dua kurso estas por junaj komencantaj instruistoj. Ĝi okazas en la Teknika Pedagogia Instituto kaj daŭros du jarojn. Je la fino de la kurso estos ekzameno.

Gravan kontribuon al tiu ĉi sukcesa laboro fare de la sindikata gvidantaro faris la kamaradoj: N. Aleksiev, G. Dikovski, St. Dobrev, Rajĉev kaj al.

Krom la instruistaj kursoj en Sofio funkcias du lerneaj kursoj kaj aliaj en la Universitato. Ĉe la Kulturdomo „St. Peŝev“, Teknika Mezlernejo

pri Fajna Mekaniko kaj Teknika Mezlernejo pri Plastikoj.

En la lando generale funkcias multaj lerneaj grupoj kiuj rikoltis bonegajn rezultojn de sia agado. Lerneaj grupoj kiuj bone agas estas en Ruse, Tolbuĥin, Varna, Polski Trâmbeŝ, Burgas, Stara Zagora, Kazanlâk, Pazarĝik, Plovdiv, Levskigrad kaj aliaj.

La esperantistaj instruistoj tamen devas esti pli akurataj al la redakcio — sendante ĝustatempe informojn pri sia agado en la lernejoj.

En nia lando la vojo al la tutpopola klerigado estas klare montrita de la leĝo pri la lerneja reformo. La esperantistaj instruistoj nur devas bone utiligigi la grundon por semi konstante la grenojn de la internacia kulturo pere de Esperanto.

Boris SIMEONOV

AJTOS

La 31-an de januaro en la urba konsilantaro de la sindikatoj estis kunvokita kunveno de la malnovaj kaj novaj esperantistoj el la urbo. Ĉeestis reprezentanto de CK de BEA — k-do D. Dobrev. Estis fondita Esperantista societo kun 16 fondintaj gemembroj. La elektita estraro konsistanta el tri personoj: D. Dobrev, M. Ruseva kaj G. Lazarov decidis tuj komenci preparlaboron por malfermi Esperanto-kurson por komencantoj. Dum marto la nova kurso komencis funkcii sub la gvidado de G. Lazarov. La 16 gepartoprenantoj montras grandan intereson al la internacia lingvo kaj regule vizitadas la lecionojn.

G. Lazarov

SEVLIEVO

Antaŭ ne longe, la gimnazia instruisto Ivan Conkov petis helpon de nia prezidanto por havigo de kuracilo el eksterlando. Skribante leteron al la UEA — delegito pri medicino — D-ro Paul Denoël el Liège, Belgio, nur post 20 tagoj li ricevis la kuracilon. Admiritita de la internacia lingvo kaj de la brile funkcianta delegito — servo de UEA k-do Conkov tuj ekdeziris lerni Esperanton. Post kelkaj tagoj, li mem proponis malfermon de Esperanto-kurso en la agrikultura mezlernejo en Sevlievo. La kurso gvidas nia sperta instruisto — la prezidanto de nia Esperanto-societo — Iv. Georgiev. Kompreneble, la plej fervora kursano estas k-do Conkov mem. La gekursanoj estas tre deligentaj kaj nur post la tria leciono ili ekdeziris skribi siajn unuajn leterojn al eksterlando. La gekursanoj baldaŭ havis vitro keston por elmontrado de la ricevataj leteroj. Laŭ propono de k-do Conkov, dum la somero, kiam oni aranĝas tendaron en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Sevlievo, ni regule kunvenigos la junajn gekursanojn por praktikado de la lingvo, kanti kaj amuzi dum la liberaj horoj.

Ni intencas organizi novajn Esperanto-kursojn en la dua gimnazio, fondi vigan Esperanto-rondon per kiu ni plifortigos la vicojn de nia societo.

Bonka M. Mandeva

VARNA

Nun funkcias du kursoj por komencantoj kun 75 gepartoprenantoj — lernantoj, studentoj kaj civitanoj. La printempan balon okazinta la 24-an de marto k. j. vizitis gastoj el Kolarovgrad, Tolbuhin kaj Drjanovo. Ĉiu merkrede funkcias parolanta Esperanto-rondo. La bone aranĝita vitrino de la societo altiras la atenton de la trapasantoj kun abunda ekspozicio de Esperanto-propagandiloj, poŝtkartoj kaj revuoj.

La junulara grupo ankaŭ organizas ekskursojn kaj amuzvesperojn. La gejunuloj korespondas kun multaj landoj el ĉiuj kontinentoj.

Dum la somero nia societo atendas multajn eksterlandajn gastojn, kiuj anoncis sian alvenon.

Mara Aleksandrova

LEVSKIGRAD

La 30-an de marto okazis la jarkunveno de la societo „V. Levski“. En sia raporto la prezidanto Cv. Cvetkov trarigardis la tutjaran agadon de la societo. Dum la jaro funkcis tri kursoj, el kiuj du por gelernantoj. Sukcesojn markas ankaŭ la internacia korespondado de la esperantistoj. Post la diskutoj la kunveno akceptis rezolucion en kiu la societanoj promesas: organizi stabiligi la societon, organizi perfektigan kurson por la kursgvidantoj, plivigligi la laboron de la junulara grupo, helpi al la fondiĝo de la E-societo en urbo Kalofer, malfermi pioniran Esperanta-rondo ĉe la Plonira-Domo en la urbo, pli bone kunlabori kun la turista societo, la societo pri Bulgara-Soveta amikeco kaj la aliaj amasaj organizaĵoj.

Nečo Dermengiev

SOFIO

ESPERANTO-SEKCIO ĈE LA KOMITATO DE LA BULGARAJ VIRINOJ

Ĉe la Komitato de la Bulgaraj Virinoj estas fondita Virina Esperanta Sekcio.

La prezidantino de la sekcio estas k-ino Stefka Prohaskova — reĝisorino de la ĉefurba teatro „Trudov front“ — sekretariino estas k-ino Trajana Petkova.

La sekcio partoprenis la grandan protestan kunvenon por la plena amnestio de la grekaj kaj hispanaj politikaj malliberuloj kaj elmigrintoj.

La esperantistinoj, kiuj interesiĝas de la virinaj aferoj nepre devas skribi al la jena adreso:

KOMITATO DE LA BULGARAJ VIRINOJ — str. „P. Evtimij“ 82, SOFIO.

Tr. Petkova

La 13-an de marto 1961 la esperantistoj havis la eblecon aŭskulti raporton de k-do Atanas Lakov pri la poezio de bulgara poeto-revoluciulo Nikola Vapcarov. Post la prelego artistaj esperantistoj de ĉefurba teatro „Trudov front“ deklamis en Esperanto poemojn de la poeto. La kunveno estis dediĉita al N. Vapcarov okaze de la apero de lia poemaro „Elektitaj versaĵoj“ en Esperanto-traduko.

La estraro de la Sofia Esperantista Societo „Maksim Gorki“ sendis la 12-an de aprilo 1961 salutleteron al la unua en la mondo kosmonaviganto — la soveta majoro Jurij Alekseeviĉ Ĝagarin okaze de lia sukcesa veturado tra la kosma spaco ĉirkaŭ la Tero.

La ĉiusemajnaj kunvenoj de Esperantista Societo „Maksim Gorki“ en Sofio okazas ĉi-lunde ek de la 19 horo en la klubejo sur la Bulv. Dimităr Blagoev 2.

Esperantistoj el la ĉefurbo kaj najbaraj lokoj vizitu la kunvenojn! En ĉiu kunveno vi havas eblecon aŭskulti modelan prelegon kaj interesajn informojn pri la enlanda kaj eksterlanda movado.

Spartak Petkov

AL FINKONSTRUO DE MONTODOMO „ESPERANTO“ EN VITOŜA-MONTO

Ni publikigas novan liston de gekamaraĵoj, kiuj monhelpis ĝis nun la konstruadon de montodomo „Esperanto“ en monto „Vitoŝa“

De la n-ro 1 — 7,480 lv.

S. Moraresku, Sofio	—	50 lv.
T. Dunčeva	„	10 „
P. Stanev	„	40 „
M. Jordanov	„	15 „
Ĥ. Levi	„	10 „
P. Popnikolov	„	10 „
P. Mutaĉiev	„	10 „
E. Oljanova	„	30 „
C. Stamenova	„	10 „
St. Kadiev	„	10 „
D. Nenov	„	10 „
I. Dimitrova	„	25 „
L. Jordanov	„	10 „
N. Spasov	„	10 „
D. Simeonov	„	15 „
L. Marikin	„	10 „
V. Ĥristov	„	50 „
T. Todorov	„	16 „
V. Oljanov	„	30 „
J. Stanimirova, Burgas	—	25 „
Ivan Brill, USSR	—	200 „
Karel Kraft, ĈSSR	—	10 „

entute 8,086 levoj.

K-do Dočev el Sofio senpage preparas ferajn kradojn por la fenestroj de la tera etaĝo de la montodomo. K-ino Noeva el Sofio donacis tablon.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Speciale ni substrekas la malavaran donacon de k-do Brill el Sovetio.

La kampanjo daŭras. Donacojn kaj monhelpojn sendu al:

Esperanto-Societo „Maksim Gorki“, poŝtkesto 44, Sofio, Bulgario.

BURGAS

Dum la kuranta jaro la loka Esperanto-Societo „Nigra maro“ organizis tri kursojn, gvidataj de A. Ĉalakov, I. Momĉilov kaj J. Stanimirova. La tri kursoj jam finis siajn lecionojn. La lasta kurso gvidata laŭ la rekta metodo estis plej rezultoplena. Dank'al la bona gvidado la intereso de la gekursanoj daŭre kreskadis kaj preskaŭ ĉiuj finis la studon. Notinde estas, ke 35 el la kursfinintoj estiĝis membroj de la societo.

Aktivigis ankaŭ la junulara grupo. Ĝi ankaŭ havas multajn novajn membrojn kaj planas diversajn aranĝojn: printempa vespero, ekskursoj, letervesperoj ktp.

La jarkunveno okazinta la 26-an de februaro kritike analizis la ĝisnunan agadon. Denove oni konstatis la nesufiĉan zorgon por la agado inter la junularo. La novelektita estraro estas tre junuĝita. La nova prezidanto mem — k-do Niko Peĥlivanov estas nova esperantisto.

Lastatempe la societo ricevis je dispono unu vitrinon en la centro de la urbo kaj uzados ĝin pri la propagando.

La 25-an de marto. Agrabla printempa vespero. Brilas jam la noktaj lumoj de la apudmara urbo. Sur la stratoj rapidantaj civitanoj direktiĝas ĉu al la teatro, ĉu al la parko, ĉu al la mara kazino.

Antaŭ la Esperanto-klubo estas brue. Kolektiĝas gejunuloj, kiuj salutas sin kaj interparolas en lingvo nekonata al la ceteraj. Ĉi vespere ili pasigos kelkajn horojn kune por danci kaj amuzi sin. La klubejo estas bone ornamita kaj oni preparas ankaŭ etan programon.

Venis ĉirkaŭ 40 personoj precipe junuloj. Estis ankaŭ gastoj, por unua fojo ĉeestantaj en Esperanta aranĝo.

La sekretario de la loka E-societo „Nigra maro“, k-do M. Janev disdonis premion al 9 gejunuloj pro ilia fervora lernado en la kursoj. Kaj denove dancoj kaj ŝercoj ĝis meznokto. Kiam la junuloj, lacaj, sed kontentaj, disiĝis sur iliaj brustoj brilis novajn verdajn stelojn.

Navar Nigohosjan

LEVSKI

La 20-an de marto, dudek esperantistoj de la societo „Trumpetisto“ invitis de s-ino Kina Uzunova, vizitis la belan vilaĝon Umarevci, apud Loveĉ, kaj plenumis programon en la granda lerneja salono. Gevilaĝanoj kaj la loka inteligentularo vizitis la vesperfeston kaj por unuafoje havis okazon ĝui esperantan paroladon kaj kantojn.

La orkestro de la muzika skolo el Levski gvidita de s-ano instruisto Jordan Angelov, malfermis la solenaĵon per la himno „Espero“.

K-do B. Markov faris koncizan, sed trafan kaj bone argumentitan prelegon: — „Esperanto — fenestro al la mondo“. Sekvis deklamaĵoj, rakontoj, tujt radukataj bulgarlingve dialogoj k.a. La spektaklo finis per ludoj kaj dancoj ĝis meznokto.

Ĉiuj ĉeestantoj komprenis bone — kio estas internacia lingvo Esperanto, kian gravan signifon ĝi havas por la amikeco, interkompreniĝo kaj paco inter la popoloj en la mondo kaj ekdeziris lerni ĝin.

Do, pli ofte inter vilaĝanoj por ke ni preparu taugan grundon por la disvastigo de nia lingvo Esperanto!

Bejko Markov

STARA ZAGORA

La geesperantistoj el Stara Zagora delonge revis posedl propran klubejon. Tiu revo en la kuranta jaro efektigis.

Ek de marto 1961 la Urba Konsilantaro per dekreto desponigis al la Esperanto-societo en nia urbo klubejon sur la ĉefa strato en la centro de la urbo. La klubejo troviĝas sur la unua etaĝo de solida konstruaĵo kaj konsistas el du ĉambroj. La klubejo povas ampleksi 50—60 personojn.

Nun unu el niaj gravaj taskoj estas ekipi kaj ornaml la klubejon. Ĉefoj de entreprenoj kaj oficejoj en la urbo donacis tablojn, nigran tabulon kaj kelkajn seĝojn. De apartaj geesperantistoj estis kolektitaj monsumoj por aĉeto de seĝoj. Iuj niaj membroj donacis seĝojn, fornon k.a. Pri la ornamado de la klubejo, ni elektis komisionon, kiu konstante prizorgos pri tio.

La disponigo de klubejo estas granda ĝojo por la geesperantistoj el Stara Zagora. Tio pravas kaj montras la zorgojn de la lokaj aŭtoritatoj por disvastigo de Esperanto.

Inĝ. Dobri Dobrev

TRA LA MOVADO

RABINDRANATH TAGORE POR LA OKCIDENTA LEGANTARO. En la kadro de la ĉefprojekto de U N E S C O pri kulturaj rilatoj inter Okcidento kaj Oriento, la Eldona Societo Esperanto aperigis kolekton da rakontoj de la fama hinda verkisto kaj filozofo D-ro Rabindranath Tagore.

En la vivo kaj verko de Rabindranath Tagore esprimiĝas homa nobleco kaj grandeco de eterna volo. Serioza studado de liaj verko kaj vivago certe faciligos al la okcidenta publiko komprenon de la nuntempa Hindio.

FONDUZO „ESPERANTO-DOMO“ EN SOFIO

Al la fonduso por konstruo de Centra Oficejo de Bulgara Esperantista Asocio en Sofio venis novaj kontribuoj. La monsumo konsiderinde kreskis:

De la pasinta n-ro	15,912 lv.
1. Esperanto societo en Asenovgrad	750 lv
2. Esperanto societo en Teteven	750 „
3. Esperanto societo en Tolbuhin	350 „
4. Esperanto societo en Samokov	2,510 „
5. Esperanto societo en Ljubimec	500 „
6. Esperanto societo en Plovdiv	488 „
7. Esperanto societo en Levski	435 „
8. Esperanto societo en St. Dimitrovo	336 „
9. Esperanto societo en Pomorie	270 „
10. Esperanto societo en Jambol	200 „
11. Esperanto societo en Kllisura	159 „
12. Esperanto societo en Orjahovo	35 „
13. Angel Boŝinov	250 „
14. Dimitar Ĉavdarov	250 „
15. Jakov Vlasov, USSR	28 „

Entute ĝis la fino de marto . . 23,223 levoj.

La Centra Komitato de la asocio esperas, ke la lokaj esperantistaj societoj entreprenos energie vastan kampanjon por kolekti novajn bonvolajn kontribuojn por la konstruo de Esperanto-domo en Sofio.

ESPERANTO EN UZBEKISTANO. Laŭ du-lingva (rusa kaj uzbekistana) revuo aperanta en Taŝkent, la Internacia Lingvo rapide disvastiĝas en tiu soveta respubliko. Laŭ la gazeto, Esperanto-rondoj funkcias en la Domo de Scienculoj, Klubo de tramistoj, mezgrada lernejo, teknika instituto kaj en la Televida Centro de Taŝkent.

ESPERANTO EN LA UNIVERSITATOJ. La studenta gazeto „Studento“ publikigas liston de Universitatoj, en kiuj ekzistas katedroj aŭ kursoj de Esperanto. La enketo montras, ke en 30 Universitatoj aŭ samrangaj Altlernejoj de 18 landoj en Eŭropo, Ameriko kaj Azio la Internacia lingvo estas instruata.

Neniu organizaĵo povas havi viglan kaj rezultodonan vivon sen presorgano. La presorgano estas la plej grava instrumento de la estraro por direkti la agadon de la organizaĵo, por mobilizi la membraron kaj skizi la ĉefajn plenumendajn taskojn. Samtempe la presorgano estas la tribunio kie la membroj aperos kun siaj proponoj, rekomendoj, ideoj kaj kritikoj.

La organo de nia asocio — „Bulgara Esperantisto“ — dum la lastaj du-tri jaroj konsiderinde plialtigis sian signifon kiel utila ilo por la agado de la asocio kaj samtempe kiel interesa kunulo kaj konsilanto de ĉiu esperantisto en lia laboro samkiel en la horoj de ripozo.

Sendube ni devas fari la gazeton ankoraŭ pli interesa kaj serĉata de ĉiu esperantisto. Tio estas realigebla nur per la aktiva helpo de larĝa kaj densa reto de fidelaj kunlaborantoj. Tio speciale tuŝas la rubrikon „Tra la movado“. La rolo de la rubriko ne estas nur registri la faktojn, sed precipe analizi ilin kaj tiel helpi al la intersanĝo de sperto inter la societoj kaj apartaj esperantistoj.

Niaj kunlaborantoj ĉiam devas konsideri tion. Forlasante la ordinarajn faktojn, oni devas akcenti la novajn kaj pli efikajn metodojn de laboro, la iniciatojn, kiuj estas imitindaj ankaŭ aliloke. Apartan intereson prezentas la faktoj pri oficiala rekono de nia movado fare de respondecaj lokaj instancoj; pri larĝa kaj rezultodona propagando kaj agado inter la junularo kaj lernantoj; konkretaj faktoj pri manifestigo de la internacia amikeco ĉu laŭ la vojo de la internacia korespondado, ĉu alimaniere.

Menciinde estas, ke multaj societaj estraroj ne alkitimiĝis skribi pri sia agado, pri diversaj interesaj iniciatoj al la redakcio de la organo kaj kontentigas per unu konciza kaj sensignifa noto de jarkunveno al jarkunveno. Tiel sur la paĝoj de la gazeto aperas ĉiam la samaj aŭtoroj, kaj la samaj urboj kaj vilaĝoj. En la korespondaĵoj pri la agado de la societoj ofte mankas konkreta materialo kaj analizo. Ni ofte legas pri novefonditaj kursoj, sed neniam ni legas kiel laboris tiuj kursoj, kiom da kursanoj sukcese finis, kiamaniere la novaj gekursanoj komencis partopreni en la movado ktp. En la materialoj de la jarkunvenoj ekzemple, ofte oni sciigas, ke la membroj faris utilajn proponojn por plibonigo de laboro. Pli utile estus anstataŭ tiu nuda kaj sensignifa frazo menci kaj analizi la proponojn mem.

Samtempe la gekamaradoj devas esti pli postulemaj al si mem pri la prezentataj materialoj. Tiel ili multe helpas al la redakcio.

Ing. S. Simeonov

GRAJNOJ EN VENTO

Marcel Erbetta, instruisto en Bienne-Biel, Svislando, komencis treege gravan kaj interesan iniciaton — pruvi al la socio, ke Esperanto estas la lingvo por la gelernantoj de la tuta mondo. Do, nia svisa kolego estas iniciantinto de „Graĵnoj en vento“ — Tutmondaj Interlernejaj Rondo. La 11-an de Januaro 1961 li eldonis albumon kun tre interesa enhavo. Paĝoj 3—16 enhavas tekstojn kaj desegnaĵojn verkitajn de geknaboj 5—16-jaraj el Svislando, Finnlando, Jugoslavio, Sovet-Unio (Voroneĵ kaj Erevan), Anglio, Bulgario (vilaĝo Polski Trâmbeŝ), Kamerun, Kamboĝo, Germanio, Danlando, Japonio, Usono, Ĉeĥoslovakio, Aŭstralio, Brazilo, Francio. La materialoj estas tre variaj kaj interesoplenaj.

Sur paĝo 17 s-ro Erbetta donas instrukciojn por geinstruistoj: Kiel partopreni en la rondo „Graĵnoj en Vento“; sur paĝo 18 — instrukciojn por Esperanto-klubo; sur paĝoj 18—19 — temojn pri kiuj plej ofte verkas la infanoj. Tie ĉi mi volas substreki, ke inter ĉiuj temoj, kiujn donas la iniciatinto plej interesa estas punkto 15-a: Pri tutmonda paco per la amikeco kaj la kunlaboro inter la infanoj de ĉiuj popoloj, senkonsidere al raso, religio aŭ mond-koncepto de la koncerna lando.

Ni varme rekomendas al la esperantistaj instruistoj el nia lando sekvi la ekzemplon de k-do Hristo Manolov direktoro de la gimnazio en vilaĝo Polski Trâmbeŝ, kaj kontribui por la sukceso de „Graĵnoj en Vento“.

I. S.

LA GEEDZOJ A FU KAJ ALIAJ RAKONTOJ

de To Haoj,

Hanojo, Fremdlingva eldonejo, 1960

Kiel packolombo ĝi traflugis al ni el la frata Vietnamio. La libro entenas tri rakontojn pri la Taj-nacimalmulto en la aŭtonomia regiono Taj-Meo (nordokcidento de Vietnamio).

En la unua rakonto „La geedzoj A Fu“ la aŭtoro kortuŝe rakontas pri la malnova vivmaniero de la vietnamaj homoj, ĉe la kondiĉoj de la burĝeŭda reĝimo kiam la kampoj kaj la riĉaĵoj estis en la manoj de la ekspluatantoj. Precipe terura estis la vivo de la junaj virinoj, kiuj ne rajtis eĉ mem elekti edzon, sed ilin oni vendis al la estonta edzo. La heroino de la rakonto estas la junulino. Miu, kiu estas forrabita el la domo fare de iu riĉula filo al kiu ŝia patro ŝuldas monon. Interese estas priskribitaj la malnovaj kutimoj kaj moroj de la burĝeŭda subigantoj kaj de la francaj okupantoj. Estas blinde priskribita la batalo de la junularo por liberigo kaj firma fido en la pli bona estonteco.

La dua rakonto „Savu nian teron“ vive prezentas al ni la batalon de la vietnamoj por konservo de la rikolto en la malgrandaj kaŝitaj en la altaj moŝtoj dometoj, for de la malamikaj militbazoj. En la komuna batalo elkreskas la nova vietnamia virino kiu kune kun la viro partoprenas la naciliberigan batalon.

La tria rakonto „Miong Ĵon“ — la plej longa kaj la plej interesa, respegulas bonege la morojn, la lokajn kutimojn kaj la batalon por liberigo el la sufokigaj feŭdo-burĝa reĝimo kaj franca okupado. Kiel ruĝa fadeno tra la tuta rakonto reliefigas la amo kaj la aspiroj de la junulo Saa, kiu plenumante la malnovajn kutimojn sin dungas por senpaga laboro ĉe la patro de sia amatino. Viciĝas bildoj

de sindona batalo, rakontoj kaj kantoj konservitaj de la praavoj vietnamiaj. . . sed tagon post tago la batalo por pano kaj liberigo disvastiĝas, centoj kaj centoj da novaj batalantoj eniras la vicojn de la liberiga armeo kaj fine la venko venas kaj alportas la delonge sopiratan liberon. Revenas ankaŭ la heroo Saa jam kiel nova homo liberigita de la malnovaj antaŭjuĝoj.

La interesa kaj alloga enhavo kaj flue legebla traduko nin kaptas por tralegi la libron je unu spiro.

Ni dankas al la vietnamaj kamaradoj, ke ili pliriĉigis niajn bibliotekojn per nova kaj riĉenhava libro kaj tutkore rekomendas ĝin al niaj legantoj.

Tinka Lakova

SCIIGOJ EL LA ASOCIO

Por krei favorajn kondiĉojn por pli rezultodona kaj celkonforma laboro kaj plialtigi la lingvan nivelon de la esperantistoj en nia lando, la Estraro de CK de BEA decidis ĉesigi la agadon de la Esperanto-Instituto.

Estas kreita ĉe CK de BEA Lingva Komisiono kun konsultaj funkcioj, kiu okupiĝas pri lingvaj demandoj laŭ komisiono de la Estraro de CK de BEA.



La Estraro de CK de BEA sciligas al la estraroj de la lokaj societoj, ke lastatempe iuj nedisciplinitaj esperantistoj proprainiciale sendas al la lokaj societoj kaj apartaj esperantistoj leterojn, cirkulerojn por kolektado de monsumoj, invitilojn por abono de stencilitaj gazetoj ktp.

Ni avertas la estrarojn de la lokaj societoj kaj ĉiujn bulgarajn esperantistojn, ke CK de BEA komisiis neniun per tiaj taskoj.

Oni sendadu ankaŭ estonte abonpagojn por „Bulgara Esperantisto“, membrokotiĝojn kaj monsumoj por la Esperanto-Domo en Sofio nur al la jam anoncitaĵ kaj konataj adresoj.

NI FUNEBRAS

Nia vigla kaj ĉiam gaja samideanino

DORA HRISTOVA

(sekretarino de la Esperanto-Societo en Bankja)

forpasis je la 19 de aprilo 1961.

Ŝia entuziasmo kaj fervoro en la por-esperanta laboro estu modelo por ni.

Gekamaradoj, varbu abonantojn por:

„BULGARA ESPERANTISTO“ — abonkotizo 14 lv.

„PACO“ — abonkotizo — 12 lv.

*Sumojn sendu al la
BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO —
Sofio, Poŝtkesto 66*

Deziras korespondi:

BULGARIO

Junaj esperantistoj ĉe la 1-a kurso de Agrikultura Teknikumo en urbo Sevilevo — kun ĉl. ĉt, p. k.

Stanke Dimitrovo, str. Rodopi 7-a, s-ino Angelina P. Angelova — kun gejunuloj ĉ. l., ĉ. t.

Teteven, str. Georgi Dimitrov 84, s-ano Evgeni N. Bărdarov — kun ĉina akvarelpentristo.

GERMANIO

DDR, Pirna-Copitz (Elbe, Lieberthaler Str. 22, Willy Stand — interŝanĝi fotojn el Ĉinio, Mongolio, Indonezio, Koreo, Vietnamio.

ITALIO

Bologna, str. de la Kamparo n-ro 4, Sarti Giulio — kun samaĝaj (14—15) infanoj.

INDONEZIO

Jogjarta, Djl. Dagan 56, Cie San Sien — kun ĉ. l. pri ĉt.

Jogjakarta, Djl. Malloboro 189, Hioe Go An — kun ĉ. l. pri ĉt.

Jogjakarta, Djl. Djogonegaran, Gt6/476 Wang Qing Hwang — kun ĉl pri ĉ. t.

Jogjakarta — Djawa, Kongsil Lama/Kantit Redjo 110, Lie Djine Hwee — kun ĉl. pri ĉl.

JAPANIO

F-ino Mieko Yamoto, 13-jara, lernantino, 54—3 Macunami-cho Takasago, — kun ĉl, ĉt.

F-ino Jukiko Irie, 18 jara oficistino, 226—2 Iho-cho, Takasago, — kun ĉl, ĉt.

S-ro Yosijasu Sasaki, 17-jara laboristo aŭtomobilfabrika, Shimizu-cho, 1433, Takasago.

S-ro Norikazu Hamatani, 27-jara, oficisto. Takasu Iho-cho. Takasago kun ĉi pri ĉt.

USSR

Litova SSR, Prienai, Revuonos 19, A Jurevičius interŝanĝi pm, bk. f. de artistoj, gramofondiskojn ktp.

Hemlnickij, str. Karla-Libknehta 42/1, Kročeki Leo Jakov kun serloza filatelisto ĉl. pri pm.

Litovio SSR, Šeduva girininkija, Stoniui Ričardui — pri ĉt.

Kalinin 13, Valentina Rudik (studentino de pedagogia instituto) do vostrebovanija, — kun bulgaroj pri ĉt.

Ĉerkaskaja obl. str. B. Hmelnickago 10, Sizarov A. B. por traduko ruslingven deziras ricevi skizojn, novelojn, esperantigitajn el nacia literaturo pri la temoj: 1. Patrino amo (el vivo homa aŭ besta); 2. Amikoj de la homo (el besta mondo) kaj 3. Ĉasado, fiŝkaptado.

Stavropolskij kraj, Apolonskij r-n, st. Zolskaja, ul. Kalnina, 28 Petro Frolov, eksinstruisto, interesiĝas pri stenografio, cirka arto.

ĈEHOSLOVAKIO

Svit pod Tatrami, Domov 1—412, Elena Romza-Sucharova kun bulgaroj pri ĉt.

REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,
Kiril DRAJEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis: P. Georgieva

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Sofia, Tel. 7-46-01, Ĉek-konto 15/1052

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia

KOLEKTO DE RAKONTOJ

BULGARA PROZO

Eldono de la Ŝtata Fremdlingva Eldonejo

Redaktoro Asen Grigorov

Formato 14,5×21 cm, 240 paĝoj, tole bindita, aparta ŝirmkovrilo, luksa papero.

Prezo 10,50 levoj

Liveras BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO, bulv. Stalin 40, Sofia. La libro estas trovebla ankaŭ ĉe la ŝtataj librejoj en la pli grandaj urboj de la lando.

La plej konvena donaco
por via eksterlanda korespondanto estas

ELEKTITAJ VERSAĴOJ

de NIKOLA VAPCAROV

kun antaŭparolo de HRISTO RADEVSKI
sub la redakto de ATANAS LAKOV

Luksa papero, broŝurita, paĝoj 72

Aĉetebla ĉe la librejoj de la Bulg. Esp. Kooperativo
en Sofio kaj ĉe la librejoj de „Peĉatni proizvedenija“ en la
pli grandaj urboj de la lando.

Prezo 6,70 lv.

